

Bulgara

ESPERANTISTO



* * *	Vivnecesa programo kun granda signifo	1
* * *	Paco!	3
	Asen Grigorov. Paco en Vjetnamio	4
	Ivan Vazov. Levski. Tradukis S. M. Simeonov kaj A. Grigorov	5
	Prof. Ivan Unĝiev. Pri la ideologio de Vasil Levski	5
	Kovo. Celebro de la Esperanto-veterano Meleško Ŝiŝkov . .	7
	Asen Grigorov. Kun maŝo ĉirkaŭ la kolo	7
	Svoboda Damjanova. Renkontiĝo de esperantistoj en Kazanlâk	10
	D. Titerjakov. E-kurso en u. Septemvri	11
	M. Petrova, D. Papazov. II-a Vintra Esperantista Ferio en Budapeŝto	12
	L. G. Kapustin. Esperanto-letero	12
	Arturs Kubulnieks. Esperanto-letero	12
	D-ro Boris Nedkov. Ankoraŭ foje pri la bulgara E-gazetaro	13
	Filip Serafimov. Renkontiĝoj kun la kontraŭkomunista pro- pagando	14
	Venelin Mitev. Valora kontribuo al la traduk-literaturo . .	15
	Elvira Lippe. Mi konas la kolorojn Kion ŝatas birdojn	16
* * *	Deziras korespondi	16

Sur la kovrilpaĝo:

Portreto de Vasil Levski — la Apostolo de la bulgara libero

Abonkotizo: iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205
Bukureŝti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika-
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Mos
kva V—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**VIVNECESA PROGRAMO KUN GRANDA SIGNIFO**

Unu el la plej popularaj dokumentoj en nia lando fariĝis la Decidoj de la Bulgara Komunista Partio, prenitaĵ de ĝia Decembra Plenkunsido fine de 1972.

En miloj da kunvenoj en uzinoj, fabrikoj, oficejoj kaj kvartaloj de urboj kaj vilaĝoj antaŭ laboristoj, oficistoj, vilaĝanoj-kooperativanoj, sciencistoj, reprezentantoj de la artisma inteligentularo, studentoj, junularo ktp elstaraj partiaj kaj ŝtataj agantoj klarigas la grandajn — proksimajn kaj malproksimajn — perspektivojn, kiujn la Decidoj de la Decembra Plenkunsido malkovras antaŭ nia popolo. Tia klarigo estas necesa, ĉar la sorto de tiuj Decidoj, ilia transformo en realajn agojn dum la antaŭstaranta jardeko dependos ekskluzive de la iniciativo kaj la entuziasmo de la plej vastaj tavoloj de la laboruloj en nia lando. La realigo de tiuj planoj ne estas ebla sen la aktiva partopreno de ĉiu civitano, en kiu ajn sektoro de la nacia ekonomio kaj kulturo li laboras.

Kion prezentas tiuj ĉi Decidoj? Kion ili celas?

La programo, akceptita de la Plenkunsido, estas konkreta krea disvolvado de la Decidoj de la Deko Kongreso de Bulgara Komunista Partio. Tiu programo respondas al la streboj de ĉiuj civitanoj de nia Patrolando kaj ilustras plej bone la ĉefan celon de la socialismo — ĉion por la bono de la homo, ĉion por la feliĉa vivo de la popolo!

Centran lokon en la Decidoj de la Decembra Plenkunsido okupas la demando pri plialtigo de la enspezoj de l' laboruloj. Jam en la kuranta jaro oni antaŭvidas plialtigon de la salajroj de l'instruistoj, de la medicinistoj kaj de la subteraj laboristoj. Oni altigas ankaŭ la minimuman laborsalajron. Flue efektiviĝos science motivita reformo de la laborpagado.

Konsiderinde kreskos la rolo de la sociaj konsumfondusoj en la plialtigo de l' enspezoj de la loĝantaro. Iom post iom la ŝtato prenos sur sin la tutan vivtenon de la juna generacio — ekde la naskiĝo de l' infano ĝis la fino de la supera studado.

Estas fiksitaĵ vico da taskoj en la sfero de la pensioj kaj la prezoj, por kontentigo de la bezonoj de l' loĝantaro per konsumvaroj ktp. Apartan atenton oni turnas al la loĝejproblemo. La zorgo pri la homo estas videbla ankaŭ en la entreprenoj por plibonigo de la socia priservado, samkiel en la solvo de la maturaj jam problemoj pri la labortempo kaj la plibonigo de la labor-kondiĉoj.

Paralele kun la problemoj pri enspezoj kaj konsumado, la kompleksa programo de la Decembra Plenkunsido donas grandan atenton al la problemoj pri kreo de bona soci-psikologia klimato en la kolektivoj kaj por plue aktivigi la partoprenon de la laboruloj en la administrado de la socio kaj la ŝtato.

La Bulgara Komunista Partio kaj la Popola Registaro ne donas vanajn, demagogiajn promesojn. Ili plenumas ĉion, kion ili diras. Ili mobilizas la vastajn popolamasojn en la nomo de la plej alta celo — la bonstato kaj la feliĉo de la popolo. Ja sen bone organizita mondnivela ekonomio, sen alteproduktiva laboro sur moderna teknologia bazo, sen ekrego kaj apliko de la atingoj de l'scienc-teknika revolucio ne eblas realigi seriozan kaj science motivitan plialtigon de la vivnivelo de l'popolo.

Nun en la vivo de nia lando ne estas pli grava tasko. Tial ĉiuj organizaĵoj ellaboras aldone laborplanojn por garantii ne nur la plenumon, sed ankaŭ seriozan superplenumon de la ŝtataj planoj. Tio estas la rezervoj, kiuj kuŝas en la sino de la ekonomio. Ili devas esti malkovritaj kaj utiligitaj, transformitaj en materialajn kaj spiritajn bonojn por eniri la vivmanieron de la popolo kaj plialtigi ĝian nunan vivnivelon.

La bulgaraj esperantistoj ne povas resti indiferentaj. Temas pri ilia propra estonteco, pri la estonteco de iliaj infanoj. Kiel parto de sia popolo ili estas gravege interesataj pri la plena efektivigo de la Decembraj Decidoj.

La bulgaraj esperantistoj devas enmeti siajn personajn fortojn en la laboron de la kolektivoj tiel, ke estu atingita sentebla plibonigo en la organizado kaj la produktiveco de la laboro, en la funkciigo de l' atingoj de la scienc-teknika revolucio. Kiel partoprenantoj aŭ gvidantoj en la laborproceso, en la sciencesploraĵ institutoj, en la sistemo de la popola instruado, de la sanprotekto ktp ili povas esti en la unuaj vicoj de la batalantoj por tutpopola feliĉo.

Krome, per siaj skribaj kaj rektaj kontaktoj kun esperantistoj el aliaj landoj ili povas klarigi konkrete kaj konvinkte la karakteron kaj la atingojn de la paca krea laboro de nia popolo, la celon de la granda ofensivo por plikreskigo de la popola bonstato je ekskluzive alta nivelo.

Tio helpas al ĉiu neantaŭinfluita homo en eksterlando vidi, ke la bulgara popolo ne havas alian pli sanktan taskon ol tiun ĉi: batali konsekvence kaj firme por konservo de la paco en la mondo, por paca kunekzistado de la ŝtatoj kun malsama sociordo, ĉar nur tiel ĝi povus trankvile kaj bonrezulte krei sian materialan kaj kulturan bonstaton.

Kaj por la esperantistoj en ĉiuj landoj devas esti klare, ke nur la pli favora internacia klimato de mondo sen armiloj, mondo sen militoj, mondo de sekureco kaj ekonomia kaj kultura kunlaborado povas krei konvenajn kondiĉojn por starigo kaj larĝaspekta solvo de la problemo pri la Internacia Lingvo kaj pli speciale — pri la praktika uzado de Esperanto en la interŝtataj kaj internaciaj rilatoj paralele kun la grandaj naciaj lingvoj por pli plena servo al la postuloj kaj la bezonoj de la nuntempa homaro.

29-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

21—27 de julio 1973

La Kongreso okazos en u. Sarajevo (Jugoslavio) — ĉefurbo de Socialista Respubliko Bosnio kaj Hercegovino. Temo de la Kongreso: „Junularo kaj hom-medio“ kun prelegoj, referaĵoj, diskutrondoj k. a.

Programo: laborkunsidoj, seminarioj, kultur-amuzaj aranĝoj, renkontigo kun la loka junularo, studvizitoj, ekskurso kaj aliaj publikaj manifestaĵoj. Detalan programon oni nun preparas. Ĝi estos laŭeble adaptita al la kongresa ĉeftemo.

Adreso: 29-a Internacia Junulara Kongreso, V. Pelagiĉa 8/I, 71 000 Sarajevo, Jugoslavio.

PACO!

Ĝoja, longeatendita kaj elsuferita sciigo kiel fulmo ĉirkaŭis la mondon
Paco en Vjetnamio!

La popoloj ekspiris facile, kun ĝojo kaj kontentiĝo. Venis fine la ĉesigo
de unu kruela, maljusta kaj abomena milito.

Dektri jaroj de heroa kaj abnegacia batalo por libero kaj sendependeco
de la nobla vjetnama popolo.

Jaroj de pezaj malfacilaĵoj kaj epopea firmeco.

Jaroj, kiam la vjetnama popolo, ekstarinta al batalo por defendo de sia
patrolando, de sia domo, de la fruktoj de sia sankta tero gajnis la simpa-
tion de la tuta liberama kaj justecama homaro.

Dektri jaroj de plej furioza agreso. La usona imperiismo sternis sangta-
piŝon super la liberan florantan landon. Alternis prezidentoj kaj doktrinoj, sed
ĉiam restis la malamo kaj la barbareco, per kiuj la imperiismo provis starigi
al mortpafo tutan popolon.

La vjetnama popolo tamen venkis!

Venkis, ĉar en la incendio de plej pezaj bataloj ĝi ne estis sola. Mal-
antaŭ ĝi staris la socialista landaro frunte kun la potenca Soveta Unio.
Defende al la libero de Vjetnamio levigis milionoj da homoj el la tuta pla-
nedo. Kun ili estis ankaŭ miloj da honestaj homoj el la usona lando mem.
La venko de Vjetnamio estas venko ne nur de la vjetnama popolo, ĝi estas
venko ankaŭ de la solidareco de l' popoloj el la tuta mondo kontraŭ la im-
periismaj minacoj al ilia propra libero kaj sendependeco. Tio estas venko de
la socialisma internaciismo.

La tuta bulgara popolo elkore kaj sincere dividas la ĝojon de Vjetnamio
kaj de la tuta homaro. Ĉar ekde la unua tago de la maljusta milito ni kun-
sentis kaj suferis kune kun niaj vjetnamaj fratoj, ni admiris ilian heroecon
kaj noblecon.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, parto de nia liberama popolo, ĉiam firme
kredis en la venko de la vjetnama popolo kaj helpis laŭpove ĝian batalon.
Nun, kiam la kanonoj eksilentis, kaj la vjetnamaj bravuloj transpaŝas
la sojlon al paco kaj paca restarigo kaj unuigo de sia lando, ni same estas
pretaj per ĉiuj niaj fortoj subteni ilin.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, kaj nia tuta popolo estos ĉiam fidelaj
amikoj de la nobla kaj liberama vjetnama popolo. Kaj frunte kun Sovet-
unio, kun la tuta socialista tendaro kaj la honestaj homoj en la tuta mondo
ni batalos sindone, por ke ĉiu popolo estu sola mastro de sia sorto!

AL LA VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO

68 Ly thuong kiêt, Hanojo

Karaj vjetnamaj gefratoj,

Ni, MEM-anoj, kun grandega ĝojo renkontis la subskribon de la longe atendata pac-
kontrakto pri ĉesigo de la barbareca usona agresmilito kontraŭ la nobla vjetnama popolo.

Dum la tuta periodo de via abnegacia rezistado kontraŭ la interveno ni staris morale
je via flanko kaj enportis nian modestan obolon por la justa venko de via heroea popolo.

Nun denove ni estas kun vi same firme, kiel ĝis nun, en la periodo de praktika aplikado de la packontraktaj klaŭzoj. La sinteno de la usona registaro kaj ĝiaj marionetoj ne estas fidinda. Ni bone konas la morojn de la imperiistoj: per unu mano ili subskribas packontrakton sub la premo de la cirkonstancoj, sed per la alia mano kaŝe kaj hipokrite preparas sabotagon kontraŭ la konsekvenco kaj honesta realigo de la packontraktaj postuloj.

Ni ĉiam admiras vian viglecon eĉ en plej teruraj kaj komplikaj cirkonstancoj. Ni ne dubas eĉ por momento, ke vi ankaŭ nun restos ĉiam viglaj kaj pretaj kontraŭstari, se necese, al ĉiuspecaj manovroj. La antaŭstaranta batalo por reala paco en Vjetnamio trovos ĉiam nian sinceran subtenon.

Amike ni premas viajn heroajn manojn, dezirante al vi je la nomo de ĉiuj MEM-anoj, novajn sukcesojn!

N. Aleksiev

prezidanto de MEM kaj BEA

Karaj samideanoj, amikoj, fratoj!

La esperantistoj el Sofio, en sia kunveno la 24-an de januaro j. k., kun grandega ĝojo kaj emocio akceptis la sciigon pri la atingita parafo de la Interkonsento inter Demokratia Respubliko Vjetnamio kaj Usono pri ĉesigo de la terura milito kaj starigo de la paco en via kara, heroa patrolando.

En tiu historia momento la esperantistoj de Sofio adresas al vi kaj al la tuta popolo de Vjetnamio siajn elkorajn varmajn salutojn!

Ni, kiuj en la daŭro de longaj jaroj kun doloro sekvis la eskaladon de la militagoj, la kruelajn bombardojn de la usonaj imperiistoj super via lando, kaj ĉiam firme deklaris nian solidarecon kun via heroa batalo, nun kune kun vi ni ĝojas, ke la usonaj barbaroj estas for de vi, ke vi povos trankvile kaj sindone labori pace por plena restarigo kaj prospero de via amata patrolando.

Ni certigas vin, karaj fratoj, ke ni, la esperantistoj de Sofio, kiel ankaŭ nia tuta popolo, estos ĉiam kun vi!

Vivu la brava popolo de Vjetnamio! Vivu la socialisma komuneco, frunte kun Sovet-unio, kiu frate helpis la justan batalon de via patrolando kaj ankaŭ en estonteco helpos la plenan restarigon de pacama demokratia Vjetnamio!

*Por la tuta ĉefurba esperantistaro —
Sofia Distrikta Esperanto-Komitato*

P A C O E N V J E T N A M I O

de Asen Grigorov

**Jam paco! Fine venka paco!
Aviadiloj ne plu zumas.
Promenas homoj sur la placo.
La radiantia suno lumas!**

**Libere la popolo spiras —
ĉar realiĝis la esperoj,
ĉar mort' kruela ne insidas,
ĉar venis fino de l'suferoj.**

**Ĉielo klara kaj sennuba —
ho revo de l'teruraj jaroj!
Ne plu ruinoj, polvo ruba!
Ne plu detruo de barbaroj!**

**Ne plu napalmo kaj bombardoj...
Sur la Vjetnama sankta tero
fiere flirtas la standardoj —
heroldoj gloraj de l'libero!**

**Ne kaŝas oni sin subtere
en la ŝirmejon mortsilentan —
rigardas klare kaj fiere
kaj kantas oni kanton venkan!**

**Jubilas Vinj, Hatin, Hanojo*!
Triumfas Longsujen, Danango**!
Sin verŝas tutpopola ĝojo!
Jam ne plu fluas frata sango!**

**Jam regas paco! Regas paco!
Jubilas, de la venk' ebria,
torente bruas sur la placo
popolo frata vjetnamia!**

**Ho, lando brava kaj martira,
saluton mian vi akceptu
el mia plena kor' admira
kun mia amo kaj respekto!**

* Urboj en la Vjetnama Popola Respubliko.

** Urboj en Suda Vjetnamio.

*100 jaroj ekde la morto de Vasil Levski —
la Apostolo de la bulgara libero (19. II. 1873)*

*LEVSKI**
de Ivan Vazov

— — — — —
Dum naŭ jaroj li
migris sen ripozo, sen dorm', famili',
sub aspekto fremda kaj sub pseŭdonimo,
preta por suferoj, kun koro sen timo,
donis li konscion, lumon per instruo
al la blindaj sklavoj en sia patrujo.
Vortoj liaj simplaj kaj lakone sorĉaj
estis plenigitaj de esperoj dolĉaj.
Li parolis ofte pri l'revoluci'
kvazaŭ pri proksima festo de l'naci',
kvankam nekonata estis ties horo;
interesis lin nur brava, justa koro —
de l'ribelo sankta de l'popol' — soldat';
ĉiu aŭskultanto estis lia frat'.

— — — — —
Ĉiu aĝo, klaso, sekso kaj metio
ĝoje partoprenis en movado tia:
riĉulo per mono; per man' — malriĉul';
kudre — junulino; mense — sciencul'.
Kaj li, malriĉulo, nur mizeron konis,
por esti utila, vivon sian donis!

— — — — —
Li estis fantom' nevidebla, mistera,
aperis en templo, amuzo vespera,
sin montris, kaŝigis denove, sen spur',
de ĉie pelata, ĉie en sekur'.

— — — — —
Signo por alarmo estis lia nomo.
Por la ŝtata povo li estis demono,
kaj sieĝis dudek urbojn la reĝim'
en la sama tempo, por aresti lin.

* La poemon de la fama bulgara nacia poeto
Ivan Vazov (1850—1921) ni donas kun mallon-
digoj pro manko de loko.

La semo mirinda en la korojn falis
kaj rikolton riĉan rapide preparis.

Lin denunciis pastro kun perfida kor',
por la templo — honto, por di' — malhonor'.

— — — — —
Sangante, en ĉenoj, inter dikaj muroj
l'Apostol' suferis terurajn torturojn.
Sed vane! Neniun povon super li
havis la tiranoj. Kaj neniu kri'
el la buŝo sonis, nek ĝemo, nek plend',
nek peto, nek damno, nek tima lament'.
La morto proksimis, sed forestis tim',
kaj perfida vorto ne aŭdigis sin.
Al ĉiu demando, al ĉiu turmento
li respondis ĉiam per plena silento
aŭ: „Mi estas Levski en propra person'!“
Neniam aŭdigis de li iu nom'.

Por inspiri timon per sia perfort'
la tiran' kondamnis lin — Levski — al mort'.

— — — — —
Pendumilo glora! Jam sanktigis vin
la mort' de l'herooj. Sankta estas vi.
De liber' vi estas terura simbolo,
sub vi por patrujo mortis la popolo.

— — — — —
Pendumilo sankta, sur vi la pereoj
ne estis malgloro, sed homapogeo
kaj pinto, de kie vidis la anim'
al la senmorteco la vojon sen fin'!

El bulgara: *Simeon M. Simeonov*
Asen Grigorov

PRI LA IDEOLOGIO DE VASIL LEVSKI
(1837—1873)

De prof. Ivan Unĝiev

En sia tuta riĉega agado, kiu pasas ĉe plej
komplikaj kaj pezaj cirkonstancoj, Levski ma-
nifestiĝas kiel granda organizanto, ideologo kaj
gvidanto de la bulgara nacia revolucio. Li mir-
konsternas per sia profunda realismo, per sia
penetremo, per la ekskluzive alta konscio pri
devo kaj respondeco antaŭ la liberiga afero de
sia popolo. La eminenta revoluciulo ne perfid-
as sin mem kaj sian revolucion devon ĝis la
lasta horo, kiam ĉe ekstreme pezaj cirkonstan-

coj li estas starigita antaŭ la speciala tribu-
nalo en Sofio kaj poste sur la pendumilo.

La granda filo de la popolo elkondukas la
liberigan aferon sur novan kaj larĝan vojon.
Sekvante la evoluon kaj la praktikon de la
naci-liberiga movado, li memstare, laŭ propra
vojo, metas la fundamenton de nova etapo en
la ideologio de la revolucia movado. Levski
emfazas, ke por sukcesi en la batalo por libe-
reco, la popolo devas kalkuli je siaj propraj

fortoj, sin prepari, organizi kaj armi antaŭe. La ideo pri tutpopola ribelo, preparita de la enlanda revolucia organizaĵo, apartenas al li.

Tri ĉefaj impulsoj inspiras la penson kaj gvidas la agadon de l'Apostolo: amo al la popolo, kulto al la libereco kaj profunda kredo, ke la liberigita patrolando havos plej perfektan ŝtatordon.

La amo al la suferplena popolo estas la sola sento, kiu emocias lian koron, kaj la ĉefa impulso, kiu flamigas lian volon al heroaĵo. Antaŭ la amo al la popolo — laŭ lia opinio — devas humiliĝi „eĉ la plej eta fiero“; antaŭ tiu ĉi amo ne estas loko por ambicio kaj vanteo. La sublima kaj profunda amo de Levski al la popolo ne atendas kaj ne serĉas rekonon, profitojn, privilegiojn. Lia oferpreteco estas abnegacia, senlima. „Mi dediĉis min al la patrujo kiel oferon por ĝia liberigo, sed ne estiĝi iu gravulo“ — deklaras la granda revoluciulo.

Li mem devenas de la popolo kaj komprenas plej profunde ĝian animon kaj en neniu momento de sia vivo li sin izolas de ĝi. Konvinkita kaj konsekvenca revolucia demokrato, li kredas antaŭ ĉio je la „matura forto de la popolo“. Aliparte, li estas konvinkita, ke la revolucio ne povus sukcesi, se la popolo ne estiĝus mastro de sia propra sorto.

La granda Apostolo difinas klare kaj kategorie la celon de la batalo: „per komuna revolucio radikale transformi la nunan ŝtatan despot-tiranan sistemon kaj anstataŭigi ĝin per demokratia respubliko (popola regado)“.

Paralele kun la batalo por politika libereco Levski volas „per la sama laboro“, kiel li mem sin esprimas, realigi ankaŭ novan perfektan sociordon, sur kies standardo staru la devizo „sankta kaj pura respubliko“.

La batalo estas direktita ne nur kontraŭ la reganta turka feŭda klaso, sed ankaŭ kontraŭ ĝiaj subtenantoj — la bulgaraj ĉorbaĝioj¹.

Laŭ sia maniero, per klereco kaj esprimforto karakterizaj al li, Levski malkovras la esencon de sia ideologio. „Jam estas tempo, — li skribas, — per sama laboro gajni tion, kion serĉas kaj serĉadas la fratoj francoj, t. e. juna Francio, juna Rusio ktp.“ La popolo penado, laŭ lia opinio, devas direktiĝi tiel, ke per sama laboro, per samaj oferoj, permiliti samtempe kun la politika ankaŭ la socialan liberigon, ne bezonante duan fojon batali. Li revas „per unu bato liberigi Bulgarion el la estonta klasbatalo, solvi samtempe kaj la problemon de sia epoko, kaj la problemon de la estonteco“. La popola revolucio, laŭ la opinio de Levski, devas fari radikalan transformigon, ne nur detruante la feŭdservutan sociordon, sed ankaŭ por ĉiam savi la po-

polon de ĉiu sklaveco kaj de ĉiu sociala maljusteco.

Tial, parolante pri „sankta kaj pura respubliko“, Levski havas antaŭvide ne tiom la formon de la regado, kiom la sociordon mem; tiu respubliko estas „demokrateca“ respubliko, en kiu la popolo estos plena mastro de sia propra sorto. Kaj kiel Ĥristo Botev batalas por organizi la vivon de la popolo „laŭ la principoj de la plej nova scienco pri la libereco“, samtiel ankaŭ Levski militas por socio, en kiu oni likvidos la ekspluatadon kaj la socialan malegalecon.

Fremda al la ŝovinismo, la Apostolo deklaras: „Nia celo en Bulgario estas frateco kun ĉiu, senkonsidere al religio kaj nacieco“. Ĉiuj popoloj en Bulgario vivos „sub la samaj puraj kaj sanktaj leĝoj“, senescepte de la turkoj mem! „Ni ne persekutas la turkan popolon, nek ĝian religion, sed la reĝon kaj liajn leĝojn.“

Ĉiuj naciecoj „estos egalrajtaj en ĉiu rilato“ kaj post la liberigo „ili estos traktataj laŭ unu kaj sama leĝo“, kiun „akceptos per plimulto ĉiuj naciecoj“. Malamante ĉiun tiranecon, la Apostolo konsideras la respublikon plej perfekta formo de regado.

Malgraŭ siaj amaraj spertoj, la Apostolo estas konvinkita partiano de la solidara batalo de la slavaj kaj balkanaj popoloj por libereco kaj demokratio. „Ni donas nian manon al ĉiu, kiu verŝos sian sangon kune kun ni por vivo kaj libereco homaj“ — li skribas al Karavelov, celante „niajn fratojn serbojn“, kiel li mem sin esprimas en la sama letero.

Deklarante, ke sur la bulgara standardo staros la devizo „Sankta kaj pura respubliko“, li kompletigas: „La samon ni deziras al la fratoj serboj, rumanoj, montenegranoj k. a.“. Kiel fincelan idealon de la balkanaj popoloj li montras la realigon de komuna „Balkana Respubliko“, kiel li mem ĝin nomas.

La granda Apostolo imagas sian liberigitan patrujon perfekta lando, kiu, kiel li mem sin esprimas, „brile famiĝos kiel ununura tiaspeca ŝtato en tuta Eŭropo“. La vojo al tiu ĉi luma estonteco estas nur unu — „Libereco pura aŭ morto“. La libereco estas supera bonaĵo.

Vasil Levski restas ĝis la fino konsekvenca revoluciulo-demokrato. La Apostolo donas sian grandan kontribuadon al la revoluci-demokratia ideologio de la naci-liberiga movado. Granda patrioto-realist, li kredas senlime je la fortoj de la popolo kaj metas la sukceson de la revolucio en plena dependeco de la organizo, la disciplino kaj la kompleta kaj sistema preparo de la popolo. En la formado, kaj pli malfrue ankaŭ ĉe la transformigo de la organizo li sekvas la principon de la demokratia centralismo kaj ĝin subigas al la volo kaj la racio de la kolektivo.

La Apostolo estas plej perfekta sintezo de
(Sur p. 8)

¹ Ĉorbaĝio — dum la turka jugo: bulgara grandposedanto, kiu ekspluatas la senhaviĝilojn; riĉulo.

CELEBRO DE LA ESPERANTO-VETERANO MELEŜKO ŜIŜKOV

Je la 10-a de januaro ĉ. j. la sofiaj esperantistoj celebris la 80-jaran jubileon de unu el la veteranoj de la bulgara laborista Esperanto-movado — s-anon Meleŝko Ŝiŝkov, la amatan



de ĉiuj „Baj Meleŝko“. La salono de la tuturbata E-Societo „Maksim Gorkij“ estis plenplena. Regis solena atmosfero.

Raporton pri la vivo kaj agado de M. Ŝiŝkov faris k-do Asen Grigorov. Ĉiuj ni estimas kaj amas Baj Meleŝko-n kiel fidelan kaj senlace laborantan por Esperanto, kiel ekskluzive modestan, bonkoran kaj honestan homon. Malmultaj tamen scias, kia sindona kontraŭfaŝista batalanto li estis. Tial oni kun grandega intereso aŭskultis la raporton pri liaj vivo kaj batalo. Antaŭ la okuloj ekstaris unu nova, tute nekonata Baj Meleŝko. . . Kaj la estimo, la amo, la admiro pri li kreskis en ĉies koro. . . .

Post la raporto de k-do Grigorov estis prezentita belarta programo dediĉe al la celebrato, kiun partoprenis la artistoj el Bulgara E-Teatro Belka Beleva, Mihail Ĉobanov, Miŝo Zdravev kaj la amatorino Stefka Kasabova.

Sekvis graŭloj, saŭparoladoj, enmanigo de memordonacoj, ĉirkaŭprenoj kaj . . . larmoj en multaj okuloj pro kortuŝo. . .

En la nomo de la CK de Bulgara Esperantista Asocio tralegis specialan adreson al la junuleulo k-do Nikola Aleksiev — prezidanto de l'Asocio. Adreson en la nomo de la Distrikta E-Komitato tralegis Krăstju Karucin. Salutis lin ankaŭ reprezentantoj de ĉiuj sofiaj E-societoj. Ĉiuj montris k-don Meleŝko Ŝiŝkov kiel modelon de vera esperantisto kaj homo — fidela kaj sindona al Esperanto, konstante laboranta por ĝia progreso, neprofitema, puranima kaj helpema al la ceteraj homoj.

Similaj celebroy forte influas la ĉeestantojn, edukas ilin en spirito de vera patriotismo kaj humanismo.

Kovo

KUN MAŜO ĈIRKAŬ LA KOLO *Parolado pri la vivo kaj agado de Meleŝko Ŝiŝkov de Asen Grigorov*

Meleŝko Ŝiŝkov naskiĝis la 17-an de januaro 1892 en urbo Bunar Hisar, Turkio. Tiutempe tiu ĉi regiono estis kompakte loĝata de bulgaroj. Tie ĉi Meleŝko finis la kurson de bulgara kvinklasa lernejo. Li elmigris al Bulgario kiel 20-jara junulo en la Balkana Milito (1912—1913). Li helpis la bulgaran armeon kaj post la falo de la fortikaĵurbo Odrin (Edrene) soldatiĝis en Sofio.

Eksplodis la interaliancana milito (1913) kaj la sekvan jaron 1914 — la unua imperiisma mondmilito.

M. Ŝiŝkov partoprenis ambaŭ militojn. Li ricevis la rangon de kaporalo kaj ordenon de braveco, sed li ne povis ne vidi la absurdon de tiuj militoj inter frataj popoloj, li indignis la korupcion de la kliko de fabrikistoj kaj komercistoj, kiuj amasigis gajnojn el la liveroj al la armeo kaj per ekspluatado de la laboruloj.

Tiamaniere, jam sur la fronto li estis varbita por la ideoj de la komunismo por mondo sen militoj. Reveninte, post la packontrakto, al Bulgario, li aliĝis al la organizo de la Bulgara Komunista Partio en la orientbulgara urbeto Ajtos, kie li laboris kiel kudristo, kaj poste kiel litkovrilisto — faristo de peplomoj.

Esperantisto M. Ŝiŝkov fariĝis en 1921.

Tiutempe la Esperanto-movado en Bulgario troviĝis en supreniro. Inter alie multaj kursoj estis organizitaj por laboristoj. Ŝiŝkov lernis en kurso de Panajot Kolev, elstara aktivulo de la laborista Esperanto-movado ĉe r.l. Fininte la kurson, M. Ŝiŝkov samtempe alprenis la pozicion de la klaskonsciaj esperantistoj, por kiuj Esperanto estis lingvo servanta por praktika aplikado de l'internaciismo, rimedo helpanta kaj organizanta la rektajn kontaktojn de ordinaraj homoj apartenantaj al la popolaj tavoloj, ilo por firmigo de amikeco inter la nacioj, por

senmaskigo kaj kontraŭbatalo de la militarismo kaj imperiismo. Kaj M. Ŝiŝkov plene sin donas al tiu batalo, sin disponigas senrezerve al la proleta internaciismo militanta por paco inter la popoloj.

En decembro 1921 oni fondis en Sofio la organizon „Balkana Liberiga Stelo“ — komunistan Esperanto-grupon, en kiu M. Ŝiŝkov aktive eklaboris.

En la fino de la 20-aj jaroj oni fondis la Bulgaran Laboristan Esperanto-Asocion, kiu aktive kaj kuraĝe, en la kondiĉoj de severa teroro kaj persekutoj, disvolvis vastan agadon: la Asocio organizis multajn societojn en la tuta lando, eldonis gazetojn kiel „Balkana Laboristo“, „Mejdunaroden Ezik“ (Internacia Lingvo), „Mejdunaroden Rabselkor“ (Internacia Laborista kaj Kamparana Korespondanto), multajn librojn, broŝurojn, lernolibrojn. Pluraj redakto-roj de Esperanto-eldonaĵoj (N. Aleksiev, Sim. Petrov k. a.) estis malliberigitaj, en kelkaj lo-koj esperantistoj estis mortigitaj (ekz. en vi-laĝo Toros ĉe unuamaja manifestacio estis mortpafita la aktiva esperantisto Dilo Jotov), policistoj batis kaj persekutis LEA-anojn. En tiu streĉita periodo M. Ŝiŝkov montriĝis sen-ŝancela, fidela, sindona soldato de la Komu-nista Partio kaj de la Esperanto-movado. Li fariĝis kaŝanto de nelegalaj eldonaĵoj kaj hel-panto de nelegalaj kamaradoj. En sia laborejo li kaŝis, post la faŝista puĉo de la 19-a de majo 1934, la LEA-librojn „Tra la ventego“ de Ĥristo Smirnenski, „Ĉe posteno“ de G. Kara-slavov, „Ruĝa Aŭroro“ de M. Ljubin, „Inter du frontoj“ de Ĥrima, lernolibrojn k. a.

Tiutempe la ebloj de partia organiza laboro estis tre limigitaj pro la riskoj kaj danĝeroj minacantaj ties organizantojn. Sed M. Ŝiŝkov neniam ektimis doni sian senrezervan helpon. En la subtegmentejo de sia hejmo en la sofia kvartalo „Lozenec“ li presigis nelegalajn bul-tenojn por poŝtistoj. Ŝiŝkov disponigis sian domon por nelegalaj konferencoj de la Partio. En unu el la antaŭpaskaj noktoj de 1935 en lia hejmo okazis granda partia konferenco. Tutan nokton Baj Meleŝko gardostaris antaŭ sia domo por ke la kunvenintoj povu trankvile

labori. Dum longa periodo li estis kaŝanto kaj „javka“ — loko por nelegalaj renkontiĝoj — de la Partio kaj de la Laborista Esperanto-Asocio, kies materialoj al- kaj reportis nia k-do Stojan Uzunov, sindona esperantisto.

Petko Napetov, deputito de la Bulgara Ko-munista Partio (iom poste murdita de la faŝi-stoj en Sofio), kiu tiutempe ĵus revenis el USSR kaj eldonis sian konatan libron, krim-deklaritan de la faŝista registaro, kaŝis ĝin ĉe Baj Meleŝko, por ke oni ne konfisku ĝin. Vi povas do imagi, kiom grandajn kvantojn da nelegala literaturo estis kaŝataj en la negranda laborejo de Baj Meleŝko.

Alvenis la jaro 1941. La germanaj trupoj okupis neoficiale Bulgarien. Ekestis kruela faŝista teroro. Aktiviĝis ankaŭ la „komerco“ de M. Ŝiŝkov. Specialaj personoj alportadis ne-legalajn materialojn, aliaj venis por ilin preni. Foje tamen la kamarado, kiu devis preni lasi-tajn materialojn, ne venis. La laborejon vizi-tis k-dino Margarita Palukova, tamen ne en la fiksita tempo—venis je horo, kiam la helpanto de majstro Meleŝko troviĝis ankoraŭ en la laborejo.

Venis ankaŭ Cvetan Dankin, esperantisto. Li diris la kaŝparolon:

— Ĉu la malgranda peplomo estas preta?

Meleŝko avertis, ke oni ne prenis la kaŝitajn materialojn. Cvetan forportis ilin.

Post nelonge, en decembro 1941, la hejmon de Ŝiŝkov blokis grupo de policanoj. Ili tra-serĉis ĉion kaj trovis pafilon, revolveron, kug-lojn. Oni arestis Baj Meleŝkon kaj lin kondu-kis al la laborejo. Oni atente traserĉis ĝin, sed trovis nenion. Ĉio nelegala estis ĝustatempe elportita.

Servis la kalvario en la Policdirekcio. Al la demandoj de la policanoj pri la kontaktoj de Baj Meleŝko, pri la kaŝado de nelegalaj ma-terialoj li respondis:

— Mi nenion konas, nenion kaŝis, nenion scias.

En la policeion oni venigis ankaŭ la kamara-dojn d-ron M. Stojkov, M. Nejĉev (post la liberigo en septembro 1944 li fariĝis prezidanto de la Pre-zidio de la Parlamento), fratoj Cvetan kaj Atanas Dankin (ambaŭ esperantistoj), Nenko Ĉendov (nun vicministro de Eksteraj Aferoj), Stojĉo Stoj-

(El p. 6)

penso kaj volo, de vivo kaj faro. Tial ĉe li mankas hezitoj, mankas disdubiĝo, mankas reiro. Inspirite de senlima amo al Bulgario kaj de la deziro vidi sian patrujon libera, li labo-ras kun nesuperitaj sagaco kaj takto, kun eksterordinara abnegacio kaj kun neelĉerpebla volo por batalo kaj heroaĵo.

Lia maltimo, la lerteco, kun kiu li eliras sendefekta el la danĝeroj, lia natura modesteco, la morala pureco, granda pacienco kaj grand-animeco kune kun la grandiozeco de liaj heroaĵoj kaj sinofero transformis lian faron en legen-don. Lia nomo estiĝis plej kara simbolo de la

popola konscio. Kaj li mem kreskis kiel unu el la plej perfektaj esprimantoj de la bulgara nacia spirito.

Vasil Levski vice kun Ĥristo Botev estas granda antaŭulo de la batalo de la laborista klaso en Bulgario, batalanto por nova socio, kiun hodiaŭ la bulgara popolo sukcese konstruas.

La ideoj, la faro, la legenda vivo de Vasil Levski, la Apostolo de la libereco, estas gran-dioza kaj inspiranta patriota ekzemplo por la bulgara popolo. Lia pura vivo kaj granda afero-restos ĉiam en la konscio de nia popolo kaj la ge-neracioj plej profunde amos lin kaj dankos al li.

ĉev (esperantisto, poŝtisto), Ivan Alaĝov (esperantisto, nun vicministro de Komunikado kaj Informado), Simeon Kolencov (esperantisto, poŝtisto), Ilija Kostov (poŝtisto, nun direktoro de la Ŝparkaso en Bulgario) k. a.

Baj Meleŝko, malgraŭ la evidentaj, nerefuteblaj faktoj, rifuzis koni iun ajn, scii iun ajn.

Kiam oni venigis Baj Meleŝko al la Centra Sofia Malliberejo, mi troviĝis jam tie, kondamnita en alia proceso. Kun M. Ŝiŝkov venis liaj multnombraj kamaradoj, juĝotaj en la granda proceso kontraŭ poŝtistoj. La politika atmosfero estis pezega. La germanaj faŝistaj hordoj staris antaŭ Moskvo. Ĉe ni regis kruela teroro. Nur antaŭ unu monato oni pendumis Nikola Botuŝev (esperantisto), Nikola Ŝopov (esperantisto) kaj aliajn.

Impresis min la alta spirito de Baj Meleŝko. Li kondukis trankvile, ridetis. Tuj aliĝis al ni malnovaj arestitoj, aklimatintaj sin al la vivo en la malliberejo, kiu estis eksterordinare peza kaj severa.

Ni, la esperantistoj en la 8-a sekcio de la malliberejo — la sekcio de mortkondamnitaj, en kiu nun troviĝis ĉiuj politikaj arestitoj, vivis interesan esperantistan vivon. Interalie ni eldonis en manuskripto gazeton „La Kajero“, kiun mi redaktis. Mi invitis Baj Meleŝko kunlabori, kaj li tuj donis sian kontribuon.

La proceso de poŝtistoj pasis. El 36 personoj 22 estis mortkondamnitaj! Inter ili ankaŭ Baj Meleŝko. Ili estis transportitaj al la malliberejo de Skopie, kie ili vivis preskaŭ tri jarojn kun maŝo sur la kolo. Sed la Soveta Liberiga Armeo nehaltigeble antaŭeniris. Ĝi liberigis la tutan Sovetan

teritorion, liberigis Rumanion kaj ekstaris ĉe la limoj de Bulgario. Je la 29-a de aŭgusto 1944 la makedonaj partizanoj liberigis siajn kunfratojn el la malliberejo de Skopie. Tio okazis 12 tagojn antaŭ la popola kontraŭfaŝista ribelo de la bulgara popolo. Baj Meleŝko aliĝis al la taĉmentoj de la makedonaj partizanoj, batalis kune kun ili kontraŭ la komuna malamiko, kaj nur tiam revenis Sofion.

En Sofio Baj Meleŝko daŭrigis sian modestan laboron — fari peplomojn kaj matracojn. Poste li eklaboris en la Bulgara Esperanto-Kooperativo kiel librovendisto. Ĉi tie li pensiigis.

Iu pensus, ke en tiu solida aĝo la senlaca pioniro rajtas ĝui ripozon. Sed Baj Meleŝko ne scias ripozi. Post la pensiigo li fariĝis libervola kaj nepagata kolportisto de Esperantolibroj. Ĉiun merkredan vesperon la klubanoj de la E-Societo „Maksim Gorkij“ povas vidi lin vendanta literaturon ĉe la pordo de la klubejo. Kiam mi foje provis levi la ledan sakon, en kiu li portas kaj reportas al sia hejmo en kvartalo „Mladost“ (Juneco) la pezegan ŝarĝon, mi apenaŭ povis fari tion. . .

Baj Meleŝko ĝis sia profunda aĝo restas tia; kia li estis dum sia tuta vivo: modesta, sindona, laborema, nelacigebla. Li restas ĉiam ekzemplo de sennoma komunisto kaj sennoma esperantisto, batalanto, kiu ne atendas premion, rekonon, laŭdon. Ekzemplo imitinda, modelo de honesta homo.

La alta ŝtata ordeno, kiun li ricevis en sia 80-a jaro, estas plene meritita.

Ni deziru al nia kara amiko, kamarado kaj kunbatalanto ankoraŭ longan vivon en bona sano. Honoron kaj estimon al li!

FESTO DE LA ROZOJ

2. VI. — 3. VI. 1973

Ĉi-jare la tradicia Festo de la Rozoj okazos en u. Kazanlâk. Ĝia devizo estas „Juneco, beleco kaj rozoj!“.

La 2-an de junio — la tagon antaŭ la festo — je la 17—21 h. en Kazanlâk okazos sportaj ludoj kaj konkuroj kaj post ili — folkloro vespero kun partopreno de famaj folklortrupoj.

La 3-an matene — solena inaŭguro de la Festo per la rito „Malfermo de la Rozrikoltado“ en la rozĝardenoj de la Instituto de la Rozoj en Kazanlâk. Sekvos popolaj kantoj kaj dancoj, karnavalo k. a.

Posttagmeze por la eksterlandaj gastoj — laŭplaĉaj ekskursoj: 1. Al Sipka-Monaĥejo kaj montopinto „Stoletov“, kie altiĝas la majesta Monumento de la Libereco;

2. Al roz- kaj fragĝardenoj kun partopreno en frag- kaj ĉerizrikoltado;

3. Al barajlago „Georgi Dimitrov“ kun promenado per motorboato.

Eksterlandaj samideanoj, vizitu belan kaj gastaman Bulgarijon!

Partoprenu la originalan Feston de la Rozoj!

Petu detalajn informojn de: „Balkanturist“ — Plodiv, Postfakto 133, Bulgario.

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN KAZANLÂK

Je la 28-a de januaro en Kazanlâk okazis renkontiĝo de esperantistoj el la urboj Plovdiv, Karlovo, Kalofer kaj vilaĝo Bogdan. La prezidanto de la loka E-Societo „Roza Valo“ Dimo Martinov faris raporton je temo „Kiel organizi la kulturklerigan laboron de la E-societo“. Li atentigis pri agadformoj kiel laŭ-temaj vesperoj, konkursoj, vesperoj de la Esperantaj leteroj, semajnoj de l'internacia

amikeco, literaturaj portretoj, ĵurnaloj parolataj k. a. Specialan atenton oni montris al la tiel nomata luma ĵurnalo parolata. Tia ĵurnalon, dediĉitan al la 50-a jubileo de la Glora Septembra Ribelo en nia lando (1923), oni demonstiris. Partoprenis ĝin Dimo Martinov, Hristo Kurumilev, Slavka Matanova, Georgi Matanov, Dimitr Cenkov kaj Svoboda Damjanova.

La partoprenantoj en la renkontiĝo vigle diskutis la raporton. Poste ili trarigardis la urbon kaj vizitis la muzeon „Iskra“ kaj la tombon de la verkisto Ĉudomir.

Svoboda Damjanova
(El ĵ. „Iskra“, n-ro 6/1973)

MODESTA, SED OBSTINA E-AGADO

Konciza informo pri la agado de E-Societo „Ĵelezniĉar“ ĉe fervojstacio Stara Zagora por 1972 j.

1. Organizita kurso de Esperanto por komencantoj, kiun finis 8 personoj. Gvidinto Todor Mollov.
2. Vizitoj al turistaj objektoj — 3 kun 32 partoprenintoj.
3. La E-renkontiĝon en Plovdiv enkadre de la Foiro partoprenis 3 membroj.
4. La 38-an Kongreson en Smoljan partoprenis 10 membroj.
5. La Internacian Turistan Renkontiĝon-Festivalon en Szeged, Hungario, partoprenis 5 membroj.
6. La Societo organizis 4 organizajn kaj kulturklerigajn kunvenojn.
7. En novembro komenciĝis nova E-kurso

por komencantoj kun 10 gekursanoj. Gvidanto — Tonĉo Vălev.

8. Ekde decembro komencis funkcii Parolanta Rondo kun pli ol 10 partoprenantoj. Konstanta gvidanto Tonĉo Vălev.

9. Celebroj de gravaj datoj — 3.

10. Abonoj de „Bulgara Esperantisto“ por 1972 j. — 15; abonoj de eksterlandaj E-periodaĵoj — 3.

11. Abonoj de „Bulgara Esperantisto“ por 1973 — 15.

12. La membroj de la Societo vaste korespondas kun eksterlandaj samideanoj.

Sekretario: T. Vălev
Prezidanto: E. Mitev

ESPERANTISTAJ RADIO-AMATOROJ!

Jam venis la tempo, ke ankaŭ vi organizu vin en aparta sekcio de Bulgara Esperantista Asocio. La radio estas vasta, fakte nemezurebla kampo por Esperanto-laboro. Ni devas plugi kaj semi ankaŭ tiun kampojn. Kompreneble — organizite!

En 1970 j., enkadre de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, estis fondita Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj

(ILERA), kiel kolektiva membro de UEA. Ĝi jam eklaboris, eldonas sian bultenon ktp.

Por organizi nacian ILERA-sekcion la bulgaraj esperantistaj radio-amatoroj devas ekkoni sin, krei kontaktojn inter si. Tiucele ni invitas ĉiujn radio-amatorojn tuj anonci sin je adreso:

Georgi Angelov — str. „Zavoja na Ĉerna“, bl. I, Pazardĝik.

La Ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris per la alta titolo „Heroo de la socialisma laboro“ generalon-majoron SLAVĈO RADOMIRSKI lige kun lia 60-jariĝo, pro lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo kaj en la konstruado de la socialismo.

***Noto de la Redakcio.** Generalo Slavĉo Radomirski naskiĝis en 1913 j. en v. Elov Dol, distrikto de Pernik. De siaj junulaj jaroj li eniris la batalon de la laborista klaso kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo. Ekde 1943 j. li estis partizano en la Trântaĉmento, poste en Radomir-taĉmento, kies komandanto li fariĝis. Post la popola venko je la 9-a de septembro 1944 j. generalo Radomirski partoprenis la militon kontraŭ hitler-*

rista Germanio. Ĝis nun li laboras en la sistemo de la Ministerio de Popola Defendo. Li estas ankaŭ popola deputito en la Parlamento.

Generalo Radomirski estas aktiva esperantisto de antaŭ la Naŭa de Septembro 1944. Nun li estas membro de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“, kie li ankaŭ prelegis dum societa kunveno.

E-kurso en u. Septemvri

La 3-an de januaro ĉ. j. en la klubejo de fervojstacio de u. Septemvri estis malfermita E-kurso por komencantoj. Gasto estis Ivan Stranski — sekretario de E-Societo „Radio“ en Pazarĝik. Li parolis pri la signifo de Esperanto kaj pri la E-movado en nia lando kaj bondeziris sukceson al la novaj gekursanoj — konstrulaboristoj, junuloj, lernantoj k. a. Kursgvidanto — Blago Blagov.

D. Titerjakov

BIBLIOTEKISTOJ!

BIBLIOTEKLABORISTOJ!

Aliĝu al la Internacia Esperanto-Asocio de Bibliotekistoj (IEAB)!

Ĝiaj celoj estas:

Kuraĝigado de internacia kunlaborado inter bibliotekoj, naciaj kaj internaciaj asocioj kaj individuaj bibliotekistoj el ĉiuj partoj de la mondo.

Akelado de la uzo de Esperanto por bibliotekaj aferoj.

Kreado de Esperantaj kolektoj — instruaj kaj belartaj — en la ĉefaj bibliotekoj de la mondo.

Akelado de Esperantaj lingvo-sekcioj en diversaj naciaj kaj internaciaj bibliotekaj asocioj.

Eldonado de ĵurnaleto de ĝenerala intereso al la profesio.

Kuraĝigado de diversaj bibliografiaj kaj beletraj projektoj per individuoj kaj grupoj, ekz. teknikaj vortaretoj (speciale por biblioteka scienco), Esperantaj bibliografioj, Esperantaj tradukoj de la ĉefa teknika literaturo de la biblioteka scienco en multaj landoj ktp.

Adreso:

Internacia Esperanto-Asocio de Bibliotekistoj (IEAB) 1032 Orchard Street, Toledo, OH 43609, USA.

ATENTIGO!

Canko Murgin — instruanto de Esperanto en la Supera Pedagogia Instituto en Ŝumen, estas preta laŭ invito prelegi en Esperanto dum esperantistaj kunvenoj en kiu ajn parto de nia lando pri la temoj:

1. Originalaj verkoj en Esperanto dediĉitaj al la bulgara Septembra Popolribelo en 1923;

2. Evoluo de la originala Esperanto-poezio en Bulgario;

3. Memorindaj paĝoj el la historio de la bulgara Esperanto-movado;

4. Bulgario en la etapo de maturiĝanta socialismo.

Faru proponojn al adreso: Canko Murgin, str. Dede Agaĉ 9, vh. 2, ap. 38, Ŝumen 4.

GRAVA!

URĜA!

La redakcio de la „Enciklopedto de Esperanto“ ege bezonas la jenajn bulgarajn E-eldonaĵojn:

„Nuntempa Bulgario“ — n-ro 1 de 1970 j;
„Bulgarino“ — 1—6, 8, 12 kaj la ceteraj;
„Internacia Kulturo“ — n-roj 9—10 de 1950;
„Bulgara Esperantisto“ — n-roj 1, 4, 7—8, 10 kaj cet. de 1926/27 j.;
n-ro 5 kc. de 1929/30 j.;
n-roj 1—3 de 1930 j.;
n-roj 1—4, 7 kc de 1933 j.;
n-ro 1 de 1938/39 j.;
n-roj 1—2 de 1942 j.;
n-ro 10 de 1947 j.;
n-roj 3—4, 6—7 de 1957 j.

La esperantistoj estas petataj laŭ siaj ebloj helpi la Redakcion de la „Enciklopedio“ havigi al si tiujn numerojn. Ĝi volonte rekompencos ilin laŭ iliaj indikoj. Adreso: Reinhard Hauptenthal, 6602 DUDWEILER, Franz—Schubert—Strasse 26, GFR.

II VINTRA ESPERANTISTA FERIO EN BUDAPEŝTO

De la 28. XII. 1972 ĝis la 2. I. 1973 en Budapeŝto okazis la Dua Vintra E-Ferio (VEF). Ĝin partoprenis esperantistoj el 7 landoj: Belgio, Bulgario, GDR, Italio, Jugoslavio, Usono kaj Hungario.

La organizantoj proponis riĉan kaj varian programon. Ni havis eblecon vidi la rimarkindaĵojn de Budapeŝto, okazis duontaga ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de la urbo, vizito de hungareca trinkejo, nokta promenado ktp. Ĉie nin akompanis la konata hungara afableco, kiu havis plej belan esprimon en la personoj de la rektaj organizantoj de VEF, unualoke de k-doj Nógrády, Szilagyi k. a., kiuj faris ĉion eblan por plezurigi la gastojn.

La novjaran nokton ni pasigis en restoracio „Esperanto“. Tio estis la tiel nomata Silvestra Balo. Kiam venis la 23 horo, ni, la bulgaraj esperantistoj, salutis la ĉeestantojn okaze de la alveno de la Nova Jaro en nia patrolando.

Ĝuste je la 24 horo ni aŭdis la esperantistan himnon de magnetofono kaj salutparoladon

de s-ano Otto Nógrády — sekretario de la organiza komitato.

Sekvis gaja momento: venis la ĉefa kuiristo de la restoracio portante subbrake vivan porkideton, kiu havis lakitajn hufetojn kaj rubandon sur la kolo. Ĉiuj devis teni ĝian voston por feliĉo.

La amuzado kun muziko kaj dancoj daŭris ĝis la 6-a matene.

Tiel, en agrabla esperantista medio, rapide pasis ses tagoj. Venis la adiaŭa vespero. La eksterlandaj reprezentantoj dankis al la hungaraj dommastroj pri tiu bone organizita renkontiĝo. Ili siaflanke invitis nin kaj ĉiujn aliajn esperantistojn partopreni en la venonta Vintra Esperantista Ferio post unu jaro.

VEF bone helpas por plialtigo de la lingva nivelo kaj por firmigo de l' amikeco inter la esperantistoj el diversaj landoj.

Maria Petrova — Ruse

Dimitr Papazov — Sofio

El la Esperantaj leteroj

Al Bulgara E-Asocio

Al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“

Estimataj gekamaradoj,

Gratulante vin lige kun la Nova Jaro ni, la esperantistoj el urbo Gorkij kaj de la E-Klubo „Por la Paco“ ĉe la Universitato, deziras al vi, ke via nobla agado ĉiam pli kaj pli prosperu, ke estu gloraj viaj antaŭenpaŝoj, ke viaj vicoj pleje fortikigu la poziciojn de la socialismo, ke nia kunlaborado plie disvastiĝu, ke nia komuna voĉo estu forta armilo por atingi firman pacon!

Ĉiu el ni aktive partoprenu la batalon kontraŭ la barbaraj bombardadoj de la vjetnama teritorio, kontraŭ la pirataj raboj de kapitalistoj en aliaj „varmegaj punktoj“ de nia planedo.

Kiel veraj zamenhofanoj ni aktivigu por altaj humanaj celoj!

Ĉiu el ni oferu por la efektivigo de la plej necesaj postuloj de la paco, libero kaj socia progreso!

Ni kredas, ke nur ĉe nia sencesa aktivado la vero nepre venkos ĉiujn sangajn maljustojn, kiujn kaŭzas la amerika imperiismo!

Uzante la okazon ni volas danki vin pro via aktiva partopreno en niaj „Informaj leteroj“, kiujn ni eldonas por konigi al sovetianoj la Esperanto-movadon en eksterlando. Por ke ni ne estu senargumentaj, ni povas citi, ke dum la tuta 1972 j. el revuo „Bulgara Esperantisto“ estis tradukitaj rusen kaj publikigitaj 160 ar-

tikoloj. Do pri via agado sovetianoj estas bone informitaj.

Kiel vi vidas, ni penadas disvastigi nian kunlaboradon en la kultura informado. Por progresigi ĝin, ni intencas organizi kolektivajn interkorespondadon tra la tuta socialisma tendaro, simile al tiu en la 30-aj jaroj. Diru vian opinion.

Finante la leteron, ni deziras al vi pliajn sukcesojn en 1973 j.

En la nomo de ĉiuj: *L. G. Kapustin*

Al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“

VIGLAJ KULTURAJ LIGOJ PERE DE ESPERANTO

Finigas la jaro 1972, do estas tempo por informi vin pri nia Esperanto-amikeco kun Bulgario.

Jam kelkajn jarojn nia Esperanto-rondeto „Fajrero“ en la lernejo de Ziemiery korespondas kaj interŝanĝas eksponaĵojn kun la E-Societo „Espero“ ĉe la Bazo por Teknika Evoluado en Polski Trâmbeș. La societo sendas al ni ĉiujn esperantaĵojn, aperantajn en Bulgario. Tiamaniere ni jam en 1971 eksciis, ke en 1972 la bulgara popolo festos solene la 90-an naskiĝtagon de Georgi Dimitrov. Ĉar la nomo de tiu elstara filo de la bulgara popolo estas kara ankaŭ por ĉiu homo en nia lando, nia lernejo decidis aranĝi grandan jubilean feston pri Dimitrov ankaŭ ĉe ni. Do, ni petis materialojn

ANKORAŬ FOJE PRI LA BULGARA ESPERANTO-GAZETARO

Salutinda estas la ideo de Venelin Mitev doni informon pri „La Bulgara Esperanto-gazetaro ĝis 1944 j.“, kiu aperis en „Bulgara Esperantisto“ n-ro 6, p. 13, 1972.

En la enkonduko de sia artikolo li diras, ke „specialaj esploroj pri tiu ĉi gazetaro, bedaŭrinde, ne ekzistas“ kaj „ne estas trovitaj ĉiuj numeroj de la aperintaj periodaĵoj“.

Laŭ mia sperto, kiel organizanto de Bulgara Esperanto-Muzeo, bonajn informojn tiurilate oni povas ricevi de la Bibliografia Instituto ĉe la Nacia Biblioteko „Kiril kaj Metodij“ en Sofio. En la biblioteko mi trovis grandan kolekton de malnovaj bulgaraj Esperanto-gazetoj.

Kaj nun mi volas fari kelkajn klarigojn kaj aldonojn:

1. De „*Rondiranto*“ aperis ne nur kelkaj numeroj, sed dum jaro I (28. II. 1902 — II. 1903) n-roj 1 — 12; dum jaro II (V. 1903 — II. 1904) n-roj 1 — 10; dum jaro III (III — VIII. 1904) n-roj 1 — 6.

2. La tuta titolo de „*Trumpetisto*“ estas: „Trumpetisto — senpaga esperantista gazeto“. Eldonas kaj aranĝas Esperantista Klubo — Târnovo, respondecas Rjaĥovski, gara Levski. (Bulgarlingve: „Тръбач“ — безплатен есперантски вестник. Издава и урежда есперантски клуб — Търново, отговорник Ряховски, гара Левски). Parto de la teksto estas en Esperanto.

3. „*Balkana Laboristo*“. Resp. redaktoroj: dum jaro I — Stefan Marinov, kaj dum la II-a — Simeon Petrov.

4. „*Danubo*“ — organo de la rumana kaj bulgaraj esperantistoj. Dum jaro I (X. 1910 — IX. 1911) aperis n-roj 1 — 12, kaj dum jaro II (XII. 1911 — VII. 1912) aperis n-roj 1 — 7.

5. „*Laboristo*“ — dum jaro I (XI. 1933 — II. 1934) aperis n-roj 1 — 4, dum jaroj II — III

n-roj 5 — 20, kaj dum jaro IV — n-roj 1 — 2.

Krom la cititaj en la artikolo de V. Mitev gazetoj mi aldonas la jenajn:

1. „*Unua Paŝo*“ — hektografita kun mane skribitaj literoj. Aperis n-roj 1 — 12 en Sofio (I — XII. 1903). Redakta komitato: Georgi Nikolov, Simeon Petkov, Petr Spasov. Kunredaktoro — Ĥr. T. Rjaĥovski.

2. „*Български есперантист*“ (Bulgara Esperantisto), dumonata, aperis n-roj 1 — 3 en Sofio (I — VI. 1907). Redaktoro Simeon Petkov. Bulgarlingve kaj en Esperanto.

3. „*Семе*“ (Semo), aperis n-roj 1 — 12 (I. I. — 31. VII. 1911). Redaktis D. Malĉev unue en Târnovo, ekde n-ro 7 — en Gabrovo.

4. „*Esperantujo*“ — en 1946 (januaro — n-ro 1, aprilo — n-ro 2). Troviĝas en BEM. Redakcio kaj administracio: Ruse.

5. „*Espérantio*“ — duonmonata, aperis 6 n-roj dum la jaroj 1923 — 1925 en Berlino. Redaktoro d-ro Panajot Hitrov (bulgaro).

6. „*Liberio*“ — monata revuo internacia por reformigo de la vivo. Eldonis: koopera societo „Posrednik“, Sofio. Jaro I (IV — XII. 1925) 1 — 9 n-roj; jaro II-a (IV — IX. 1926) n-roj 1 — 9.

7. „*Radio*“ — mane skribita. Jaro I, n-ro 1, julio, 1906, Orĥanie. Redaktis: Iv. H. Krestanov. Troviĝas en BEM.

8. „*Есперантска младеж*“ — organo на Ученическия Есперантски Съюз в България. (Esperantista Junularo — organo de Esperantista Asocio de Lernantoj en Bulgario). Redakta komitato. Aperis en Varna — Sofio dum la jaroj 1925 — 1927 (jaro I — 1 — 10 n-roj; jaro II — 1 — 3 n-roj kaj jaro III — 1 n-ro).

D-ro Boris Nedkov,
fondinto de Bulgara Esperanto-Muzeo

pri Georgi Dimitrov de niaj Esperanto-amikoj el Bulgario.

Nia ĝojo estis granda, kiam s-ano Ĥristo Manolov el la Bazo por Teknika Evoluado en Polski Trâmbeŝ informis nin, ke ilia Esperanto-societo plenumos nian peton. Baldaŭ komencis alveni en multaj pakadoj valoraj materialoj pri Dimitrov: libroj, gazetartikoloj, grandformataj fotoj, pentraĵoj, diafilmoj kaj kun ili ankaŭ multaj materialoj pri via lando — Bulgario. Tio donis eblecon al nia kolektivo aranĝi jam plurajn ekspoziciojn, ĝis la jubilea dato. En la jubilea tago mem ni malfermis la ĉefan ekspozicion, kiu funkciis en nia lernejo ĝis la unua tago de la nova lernojaro. Dum tiu tempo ni aranĝis plurajn prelegojn por nia loka loĝantaro pri Georgi Dimitrov, demonstris diafilmojn pri li.

Proksimiĝis niaj jubileoj: la 55-a datreveno de la Granda Oktobra Socialista Revolucio kaj la 50-a jubileo de Sovetunio. Niaj amikoj el Polski Trâmbeŝ sendis al ni eldonitajn en

Bulgario politikajn afiŝojn omaĝe al niaj du festoj. Tial ni povis aranĝi ankoraŭ 2 ekspoziciojn el bulgaraj materialoj. En la lasta ekspozicio, kiu funkciis ankaŭ nun, je la fino de decembro, ni montras ankaŭ la sendaĵojn ricevitajn el Bulgario en la antaŭaj jaroj.

La bulgaraj esperantaĵoj donis al nia lernejo multon por nia instrua kaj eduka laboro: pere de ili ni konatiĝis kun la bulgara historio, vivo, literaturo, arto, ni konatiĝis kun elstaraj homoj en Bulgario.

De leteroj el Polski Trâmbeŝ ni eksciis, ke ankaŭ niaj sendaĵoj estis uzitaj en Esperanto-ekspozicioj tie. Tio montras, ke Esperanta ludas pozitivan rolon en la internacia kulturo interŝanĝo.

Gvidanto de la Esperanto-rondeto „Fajrero“
Arturs Kubulnieks

Distrikto Aluksne, lernejo Ziemeri
228 732 Marinkalna, Latvio, USSR

Notoj de vojaĝo al Francio

de Filip Serafimov

La titolo ne havas figuran signifon. En konkreta senco, persone ni renkontiĝis kun ĝi, ĉar ni ĝin ne aŭskultis per la radio, ne legis ĝin en la ĵurnaloj, sed ĝin observis de unupaŝa distanco en la pensado, en la vortoj kaj la agmanieroj de tiuj, kiuj staris antaŭ ni.

Kiuj estis ili?

En sia plimulto junaj homoj — studentoj aŭ instruistoj de franca lingvo — venintaj tien ĉi, en la francan urbon Po por 3, 4 aŭ 6 semajnoj kun celo perfektigi la lingvon. Kaj same tiel en sia plimulto — burĝaj gefiloj, alvenintaj je privataj elspezoj. Reprezentantoj de 30 nacioj, preskaŭ el ĉiuj anguloj de la mondo. Kaj inter ili — ni: 11 bulgaroj, nuraj reprezentantoj de socialisma lando.

Ni alpaŝis malantaŭ la malpezan aĵuran ĉirkaŭbarilon de la grandega Somera Universitata Centro por Lernado de Franca Lingvo fare de eksterlandanoj kaj . . . ni troviĝis antaŭ ia nevidebla, sed sentebila fera kurteno de la kontraŭkomunista propagando. Ĉi tie la esprimo ne estas tute metafora, ĉar ekde niaj unuaj renkontiĝoj kaj interparoloj antaŭ ni vere ekstaris la peza kurteno de trompoj kaj antaŭjuĝoj, ennestiĝintaj en la kapojn de tiuj homoj.

La kontraŭkomunistan propagandon ni renkontis unue en . . . iliaj okuloj. Okuloj timigitaj, plenaj je antaŭjuĝoj, kiuj streĉe rigardis nin kun timo kaj kvazaŭ demandis: „Ah. . . vivaj komunistoj! . . . Kio okazos nun al ni?“ Tre baldaŭ tamen ili konvinkiĝis, ke ankaŭ ni estas homoj kiel ili, eĉ pli pacemaj kaj kvietaj. Kaj tiam, puŝataj de intereso, ili komencis alproksimiĝi, alparoli nin. Kaj la timo, kiu antaŭ nelonge silentis en iliaj okuloj, komencis elverŝiĝi antaŭ ni en malklara torento de mensogoj kaj trompoj, per kiuj la kontraŭkomunista propagando estis ŝarginta iliajn kapojn.

Por ni estis kaj malĝoje, kaj amuze konstati, kiel sendube saĝaj kaj ĝenerale kleraj homoj povas vivi kaptitaj de tiel naivaj kaj stultaj elpensadoj pri ni kaj pri nia sociordo.

Nenio povis malkonvinki ilin, ekzemple, ke ĉe ni ĉio, absolute ĉio estas komuna, kaj certe ili miregis, kial ni brusorbe ne manĝis rekte el la kaldrono, sed kiel ili ni nutris nin el telero, per forko kaj tranĉilo.

Ili estis tre mirigitaj ankaŭ de nia aserto, ke niaj soldatoj militservas en Bulgario. Ilia konvinko estis, ke tio okazas en USSR.

Ili starigis al ni plej mirigajn damandojn:

— Ĉi vi manĝas ĉevalan viandon?

(Eble ili volis ekscii ankaŭ pri la homa, sed ĝenis sin damandi).

— Ĉu vi havas vian propran lingvon?

(Tiu demando devenis ne nur el la neper-

mesebla manko de konoj pri tio, kio estas Bulgario, sed ankaŭ el la konvinko, ke „sklavigitaj“ de Sovetunio, ni perdis eĉ nian lingvon.)

— Ĉu ni povas viziti Bulgariion?

(Ni klarigis, ke Bulgario estas unu el la multaj landoj en la mondo, kiu havas senvizan reĝimon por la eksterlandaj turistoj, kaj ke ĉiujare nian landon vizitas du milionoj da eksterlandanoj, sed ili denove miris, ĉu oni permesos al ili, homoj el la Okcidento kaj ne komunistoj, kaj ĉu ili ne spertos ion malbonan ĉe ni).

Ankoraŭ pli nekomprenebla por ili estis tio, kiel ni, bulgaraj civitanoj, ricevis permeson vojaĝi al eksterlando. Franca studentino „konfidis“ al ni, ke evidente ĉiuj ni estas komunistoj, se oni permesis al ni eliri el la lando. Ni klarigis, ke nur kvin personoj el nia grupo estas komunistoj, kaj la ceteraj ses estas senpartiaj. Ŝi tamen ne deziris kapitulaci: „Nu, jes, sed vi ja estas ĵurnalisioj!“ Tiam ni montris al ŝi la fakton, ke en Bulgario ekzistas entute 4000 ĵurnalistoj, sed ĉirkaŭ duonmiliono da bulgaraj civitanoj pasintjare vojaĝis trans la limojn. Post tiuj nerefuteblaj faktoj al la kompatinda knabino restis nenio alie krom konkludi profundsence: „Ha, kia komunista lando vi estas tiam?“ Ni komprenis kaj kompatis ŝin, tiun Marie (Mari) en ĉi momento: ne povante akordigi la rakontitan de ni kun la „imagoj“, kiujn sugestis al ŝi la oficiala propagando, ŝi serioze ekdubis pri la ortodokseco de nia komunista sociordo.

Ne mankis ankaŭ kuriozaĵoj.

En la vagonaro ni veturis kun gimnaziano de la deka klaso, kiu havis nenian imagon pri tio, kia kaj kie estas Bulgario. Ne helpis ankaŭ nia memorigo pri la Nigra Maro. Ŝi tamen „sciis“, ke en 1968-a Ĉeĥoslovakio estis „okupita“. Tio estis konvinka ekzemplo, kiaspecajn „konojn“ oni enigis en la kapojn de la junaj homoj trans la fifama „fera kurteno“.

Iu turka studento asertis, ke la turkoj en Bulgario estas . . . 10 milionoj!

— Kaj kiom ili estas nun? — li demandis nin provoke.

— Ĉirkaŭ duonmiliono — respondis ni.

— Ha, ĉu vi vidas, kaj kie estas la ceteraj ĝis 10 milionoj? — triumfis tiu.

— Ili elmigris en Turkion — respondis ni, eĉ nekaŭzante al ni la klopodon klarigi al li, al tiu „altklara“ ŝtatano de nia suda najbaro, ke la tuta loĝantaro de Bulgario neniam estis pli ol 8 milionoj. . .

— Ne estas vere, — li diris, — ke ili elmigris. Vi mortigis ilin, kaj multaj estis simple premsufokitaj. . .

VALORA KONTRIBUO AL LA TRADUK-LITERATURO

Enri Krusten. *OKUPACIO*. Trad. Hillar Saha. Redak. Henrik Seppik.
Eld. „Eesti raamat“. Tallinn, 1972.

Niaj estonaj amikoj, en kies lando lastatempe la E-movado montras ĉiam pli grandajn sukcesojn, prezentis al ni ankoraŭ unu ĝojindan novaĵon: en la fino de 1972 en Tallinn aperis en Esperanto la romano „Okupacio“ de la fama estona verkisto Enri Krusten.

Kelkaj estas la kaŭzoj, pro kiuj oni devas gratuli la estonajn esperantistojn pro la aperigo de tiu ĉi libro.

Unue: pro la elekto de l' aŭtoro kaj de lia verko. Vere, mi konas nesufiĉe bone la verkaron de Krusten, sed tio el ĝi, kion mi legis ĝis nun, ĉiam confirmis en mi la impreson, ke li estas tre interesa, individueca rakontisto, kiu havas kion diri al la legantoj kaj scias kiamaniere ĝin diri. Ĉe li estas malfacile — aŭ pli ĝuste, ne eblas — paroili pri supereco de la emocia aŭ de la intelekta principo — ili estas en movebla ekvilibro. Krusten estas surtera, natura en siaj travivaĵoj, spontana en siaj agoj, sed li ne improvizas. Ĉe li ĉio estas bone pripensita. Ĉiuj liaj verkoj estas trasorbitaj de humanismo; lin karakterizas bonhumoro, ofte eĉ inklino al satiro. Majstro de la mallongaj prozaĵoj kaj miniaturoj en la estona soveta literaturo, aŭtoro de kelkaj romanoj, teatraĵoj kaj libroj por infanoj, pro lia lirikismo kaj rakontmaniero oni ofte komparas lian talenton kun tiu de Turgenev.

La malgranda romano „Okupacio“ (90-paĝa), kiu ricevis la premion de la Estona Soveta Socialista Respubliko por 1969, apartenas al liaj plej bonaj lastatempaj verkoj. Ĝi rakontas pri la nigraj jaroj de la hitlerista okupacio de Estonio (1941–1944). Sub la majstra plumo de Krusten reviviĝas la pezo de l' okupacio,

ĝia senlima malhumaneco, la subpremado de la vere homaj sentoj kaj idealoj, la pereigo de la homeco. Sed la aŭtoro konvinkas, ke eĉ en tiaj cirkonstancoj ne malaperas homaj sentoj kaj precipe en peze premanta atmosfero manifestiĝas eksterordinare klare la virtoj kaj la malvirtoj de la homo.

La dua kaŭzo, pro kio oni devas gratuli la eldonintojn de la libro, estas la majstreco de la tradukinto Hillar Saha (Gravan kontribuon, nature, havas ankaŭ la redaktoro Henrik Seppik.) Mi ne laŭdos ĉi tie s-anon Saha, kvankam li indas tion, tamen mi deziras noti, ke lia laboro ankoraŭ foje pruvas, ke jam ne estas sufiĉe nur scii (kvankam perfekte) la du lingvojn. Estas necese, ke la tradukanto bone sentu la aŭtoron, lian lingvan kaj bildécian mondon. Estas necese, ke li estu kapabla ĉiam trovi la Esperantan ekvivalenton de la aŭtoro kaj de lia mondo. En „Okupacio“ Hillar Saha kategorie sukcesis. Mi estas konvinkita pri tio, malgraŭ ke pro nescio de la estona lingvo mi ne povas koni la originalon. Tiel freŝa kaj riĉa estas la lingvo de la tradukita libro!...

Fine mi deziras speciale noti ankaŭ la meriton de A. Keerend, kiu elformis kaj ilustris la libron. Ĉio estas plenumita elegante, kun profunda penetremo en la sencon de la verko.

La traduko en Esperanton de unu el la plej bonaj verkoj de Enri Krusten havigos veran plezuron al la legantoj. Ĝi estas valora kontribuo al la belarta tradukliteraturo.

Venelin Miteov

(El p. 14)

Por ni ne estis facile en simila atmosfero, kaj tamen ni estis fieraj kaj feliĉaj, observante, kiel unu post alia krevas la sapvezikoj de la monstre falsitaj imagoj pri nia socialista sociordo, tiel fervore ekscitataj de la kontraŭkomunista propagando. Ĉar nia tuta estado mem tie ĝin refutis kaj venkis.

El bulgara: Rosica Georgieva
El ĵurnalo „Septemvrijsko Zname“, u. Pazarĝik, n-ro 124/1972

*Se via konato bedaŭras, ke
li preterlasis aboni „Bulgaran
Esperantiston“, ĝojigu lin:*

ABONO

ANKORAŬ

EBLAS!

Du versaĵoj de ELVIRA LIPPE

MI KONAS LA KOLOROJN

Blanka estas ŝaŭmo mara,
verda estas musk' arbara,
ruĝa estas vin' natura,
bruna estas kverka glano,
blua estas flor' cejano,
lila estas kamp' erika,
nigra estas kato Mika.

Cikonio kaptas ranojn,
sed garolo fendas glanojn.
Nokte musojn ĉasas strigo,
fremdajn ovojn ŝtelas pigo.
Kardel' sensemigas kardon,
parueto frandas lardon.
Fiŝkaptisto estas laro,
fiŝojn kaptas ĝi el maro,
kaj hirundo flugas sage,
kulojn glutas ĉiutage.
Grajnojn serĉas emberizo,
sturnoj flugas al ĉerizoj.

Diru vi, se ne sekreto:
kion ŝatas pasereto?

ATLASO DE SMOLJAN-DISTRIKTO

Ĝus aperis — kolora, belaspekta, ilustrita. Teksto nur en Esperanto. Eldonita de la Komitato de Turismo pere de la Instituto de Kartografio en Sofio. Enhavas bazajn geografi-ekonomiajn kaj turistajn informojn pri la distrikto kun fizika, voja kaj turista mapoj. Necesa kaj utila por ĉiu eksterlanda turisto kaj gasto de tiu ĉarma montara angulo de Bulgario.

Estas aparta aldono pri la Esperantomovado en la distrikto de Smoljan kaj pri Pamporovo kiel „lulilo de Esperanto-aranĝoj“.

Petu senpagajn ekzemplerojn de:
Distrikta Esperanto-Komitato, Smoljan, Bulgario.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Danail Goranov Dilov — selo Banica, Vračansko (kun ĉl pri ĉt).

Sovetunio

50 novaj esperantistoj (lernantoj, studentoj, diversfakaj oficistoj) aĝo 14—67 j., deziras korespondi tutmonde pri ĉt. Skribu al komuna adreso: Estona SSR, 202 400, Tartu, Kalevi tñ. 24 — Esperanto-klubo.

Membroj de Esperanto-klubo, diversaĝaj, plejparte junularo, deziras korespondi pri ĉt. Komuna adreso: USSR, 450 025 Ufa, abonkesto 162, Esperanto-klubo.

(Sekvas sur la kovrilpaĝo)

NI FUNEBRAS

En Kazanlâk la 28-an de decembro 1972 forpasis en sia 69-jara aĝo

IVAN ZAĤARIEV ĴELEV

Adepto de la Internacia Lingvo ekde sia juneco, li dum sia tuta vivo estis sindona, tre aktiva kaj iniciatema esperantisto, unu el la pilastroj de E-Societo „Roza Valo“ en la urbo. Zaĥariev estas aŭtoro de E-lernolibro por lernantoj (1969 j.) Li verkis multajn versaĵojn en Esperanto kaj mem komponis melodiojn.

Niajn kondolencojn al liaj proksimuloj kaj geamikoj!

La 14-an de januaro ĉ. j. forpasis en Kazanlâk en sia 61-jara aĝo

GEORGI MANEV KOSEV

Li estis longjara membro kaj sekretario de E-Societo „Roza Valo“. Niajn kondolencojn al liaj proksimuloj!

KORESPONDA SERVO DE TEJO


Koresponda Servo de TEJO anoncas sian ŝanĝadreson. Gvidantino de la KS estas: Jadwiga Greger, Sopot, Pollando, str. Kujawska 24.

KS de TEJO informas, ke oni jam povas sendi la adresojn de esperantistoj, kiuj volas korespondi, kaj samtempe oni povas ricevi korespondadresojn. Krom la nomo kaj adreso oni devas ankaŭ aldoni interesiĝojn kaj aĝon.

KS ankaŭ akceptas adresojn de E-klubo kaj rondoj, kiuj volus komune korespondi kaj kunlabori.

De tempo al tempo, se KS havos sufiĉe multe da adresoj, ĝi eldonos specialan korespondbultenon, kiun oni povos ricevi senpage.

**F
E
R
I
O
J**



ESPERANTO

PAMPOROVO - BULGARIO

*Ĉiujare sur la paradize
bela Rodopi-montaro,
Bulgario, okazas*

INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ

*En la restadejo PISANICA: 1—14 de julio kaj aŭgusto
16—29 de julio kaj aŭgusto*

Kotizoj: por bulgaroj — 42 levoj, por alilandanoj — 56 levoj.

En la restadejo PAMPOROVO: 1—14 de aŭgusto.

Kotizoj: por bulgaroj — 50 levoj; por alilandanoj — 70 levoj.

ORA ESPERANTO-FERIADO

sub la aŭspicio de la Monda Turismo (16—25 de septembro).

*Ekskursoj, konkursoj, kolektado de fungoj, gustumado de specialaĵoj,
kultura programo, vizito de muzeoj, bildgalerio k. a.*

*Oni loĝas en moderna kaj komforta ripozdomo, situanta en restadejo
PAMPOROVO.*

Kotizoj: por bulgaroj — 35 levoj, por alilandanoj — 50 levoj.

VINTRA ESPERANTO-SEMAJNO

1—6 de februaro

*skiado, glitado, konkursoj, vizito de muzeoj kaj bildgalerio, gustumado de spe-
cialaĵoj, prelegoj kun projekciado de diapozitivaj k. a. La semajno okazas
en moderna ripozdomo, situanta en restadejo PAMPOROVO.*

Kotizoj: por bulgaroj — 24 levoj, por alilandanoj — 33 levoj.

**KIU UNUFOJE FERIIS EN RODOPI-MONTARO,
SOPIREGAS RIPETI TION!**

Petu detalajn informojn kaj frue aliĝu al la feriadoj kaj la kursoj ĉe:

DISTRIKTA ESPERANTO—KOMITATO, SMOLJAN, BULGARIO

Redakta komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Marin BÂCEV, Bojka BATALSKA,
Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV,
Stefka HRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

Stepas Vyniautas — Nemuno str. 157-4, *Klaipeda* 10, Litovio, (28-j. radist) — pri bokso, filmoj, vivo de la popoloj).

Jacinaite Jadvyga — 233 028 *Kaunas*, Rimvydo str. 17—518, Litovio (22-j. — kun ĉi pri filmoj, vojaĝoj, muziko, teatro, lit-ro, historio, geografio, sporto).

Maja A. Staševskaja — *Minsk*, poŝtamt, p. k. 33 (42-j — kun ĉi pri ĉt).

Lerneja E-rondeto kaj klubo de amikeco dez. korespondi vigle kun eksterlandaj E-kluboĵ. Skribu al: Esperanto-rondeto, ŝkola n-ro 78, Sadvaja, 7, 310 128 *Ĥarkov*-128.

Margarita Dmitrieva — *Minsk*-9, str. Kozlova 52/53 (26-j. inĝenierino — kun bulgaroj pri ĉt).

Grabejite Graĵina — *Vilnius*-9, Basanavičius str. 26-2, Litovio (21-j. studentino de kemio — kun ĉi pri ĉt, bk, blazonoj, insignoj, E-literaturo).

Žuolys Kvirinas — V. Juro 67, *Kaunas* 31, Litovio, (18-j. studento — kun ĉi pri ĉt).

E. M. Zakašanskis — P. O. Box 180, *Riga* — centro, Latvio, (librotenisto — dez. korespondi tutmonde kaj interŝanĝi filatele afrankitajn kovertojn, bk, E-librojn kaj revuojn),

Suško Aleksandro — str. Taikos pr., 10—49 *Klaipeda*, Litovio (15-j. lernanto — kun ĉi pri arto, sporto, turismo, tekniko, ĉiutaga vivo bk, pm).

Jora Gavrilov — Kumpiškes str. 2-a — 1, *Klaipeda*, Litovio (15 j. — kun ĉi pri sporto, bk, pm).

Elena Igorevna Latiševa — *Uffa*-52, str. Ĉerniŝevskogo 54, kv. 2, 450 052 BASSR (14 j. — kun ĉi pri ĉt).

Jozefo Veitas — *Klaipeda*-2 „Iki pareikala-vimo“, Litovio (30 j. — kun ĉi pri ĉt, pm, bk).

Ulle Rüm — 200 029 *Tallinn*, Tammsaare tee 111—34, Estonio (16-j. lernantino — kun ĉi pri ĉt, bk de aktoroj kaj naturo, pm pri naturtemoj).

Vladimir Kulibaba — str. Kirova 13, *V. Veselajarsk*, Rubcovskij rajon, Altajskij kraj (16-j. — kun ĉi pri ĉt precipe pri matematiko kaj fiziko).

Gricius Zenonas — Akmenes raj., Papiles p-tas, *Kalniŝkiai*, Litovio (20-j. — kun ĉi pri ĉt).

Tiin Liigand — *Tallinn* 26, Ed, Vilde tee 125-10, Estonio (17-j. lernantino — kun lernantoj el ĉi).

Sergej Golovnin — Novosibirsk 90 NGU (17 j. lernanto — kun ĉi pri literaturo, scienco, gram. diskoj).

Kaljo Piiskop — str. E. Vilde 53—96, *Tallinn* 200 029, Estonio (40-j. — pri turismo,

fotoj de aktoroj, bk, pm, insignoj, boteletikedoj k. a.).

Inĝ. Viktor Sumanov — *Krasnojarsk*, p. k. 23, USSR 660 062 (35-j. — kun celo pri interŝanĝo; deziras kontakti kun seriozaj kolektantoj de libroj, gramofondisko, bk, pm, specialaj poŝtstampoj, kovertoj, ekslibrisoj, medaloj, insignoj ktp. pri ĉiuj temoj. Respondo certa).

Kaveckaite Laima — Plunges raj., Varduvos p., v. *Rotineai*, Litovio (pri ĉt., inteŝanĝas pm, bk, gramofondiskojn kun estrada muziko).

Ona Andrijauskiene — str. Gogolio 57-7, 235 319 *Panevežys*, Litovio (47-j. librotenistino — pri muziko, literaturo, pm).

Arnold Tartu — *Kehra*, Kooli 10—13, Estonio 202 240 (61-j. oficisto — kun ĉi pri ĉt).

Hillar Peebo — *Kehra*, Kirovi 7—8, Estonio 202 240 (38-j. seruristo — kolektas insignojn).

Luule Kiipli — *Kehra*, Kingissepa 24, Estonio 202 240 (40-j. inĝenierino — kun ĉi pri ĉt).

Valmi Kond — *Kehra*, Kooli 12—2, Estonio 202 240 (40-j. oficistino — kun ĉi pri ĉt, speciale problemoj de edukado; pm).

Klimenko Saša — *Ĥarkov* 100, str. Stadionnaja 10-a-36 (24-j. teknikistino — kun ĉi pri ĉt).

Civjan Julia — *Ĥarkov* 38, str. P. Dybenko 16 (30-j. inĝenierino — kun ĉi pri ĉt).

Demčenko Saša — *Ĥarkov* 1, str. Krasnoarmejskaja 12—68 (23-j. inĝeniero — kun ĉi pri ĉt, precipe pri radioelektroniko kaj distra muziko).

Lerneja E-rondeto (8-a klaso) dez. korespondi kaj interŝanĝi infanpentraĵojn, kajerojn, lernolibrojn, prilernajn fotojn k. a. por ekspozicio. Skribu al ilia gvidanto: Katilevskij Aleksandr — 310 075, *Ĥarkov* 75, pr. Orĝonikidze, ŝkola n-ro 70 (por la Esperanto-rondo).

Viktors Laškovs — *Cesis*, str. Lebedeva 28—18, Latvio (bibliotekisto — kun ĉi, interŝanĝas pm, monerojn, monbiletojn k. a.).

Levontin Anatolo — *Ĥarkov* 3, placo Teveleva 2/2, kv. 101 (24-j. inĝeniero — kun ĉi per bk).

Ŝiršova Roza — *Ĥarkov* 50, placo Fejersbaĥa 6, kv. 4 (45-j. inĝeniero — kun ĉi per bk).

Artemenko Garri — *Ĥarkov* 121, 606 mikro-rajon 1, kv. 9 (33-j. inĝeniero — kun ĉi per bk).

Goltelova Nataša — *Ĥarkov* 38, 1-a pope- reĉnaja 5, kv. 3 (17-j. lernantino — kun ĉi per bk).